

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

La lasta de 2011 estos en la 17a de dec., kaj la komenco de 2012 estos la 7a de januaro.

*Regula Klaso en merkredo

La lasta de 2011 estos en la 21a de dec., kaj la komenco de 2012 estos la 11a de januaro.

*Hama-Ronda Vespero kaj

Interklasa Lernado

jan. 21 (sab) 16h30-19h00, ĉambro 709

feb. 18 (sab) 16h30-19h00, ĉambro 710

Temo kaj lekcionto ankoraŭ ne estas fiksitaj.

*Ĝenerala Kunsido de

Jokohama Esperanto-Rondo

jan. 28 (sab) 15h00-17h00, ĉambro 710

Ĝi estas la plej supera decid-organo de JER, okazanta 1 fojon jare. Tie la lastajara raporto kaj kaso estos revuata, la 2012-a plano kaj kaso estos aprobita, kaj la novaj estraranoj estos fiksitaj. Pro la evento, la regulaj lerno-kunsidoj ne okazos.

INTERNACIA FORUMO

Ni planas prezenti prelegon pri Esperanto, kadre de la Internacia Forumo de Jokohamo, okazaĵo malfermita al la urbanoj. Ĝi okazos en la 10-a kaj 11-a de februaro, en la Seminariejo de Yokohama-Kokusai-Sentaa. La detalon poste.

TIEL OKAZIS

*Hama-Ronda Vespero

nov. 19 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 604

Temo: Pri Stereografio

Preleganto: s-ro Nanba Humiharu

Homaj 2 okuloj kune rigardas unu objekton, kaj homo povas senti ĝin kiel 3-dimensian objekton, nome kiu parto estas proksima al la homo, kaj kiu ne. Rigardu do kutiman foton. Vi povas kompreni, kiu parto estas proksima kaj kiu ne, sed vi ne sentas tion, ĉar estas nur bildo sur 2-dimensia papero.

Nu, vi uzu 2 fotilojn, metitajn en speciala kondiĉo, kaj celu la saman objekton; vi akiras paron da fotoj. Kaj rigardu ilin per viaj okuloj. Prefere vi uzu specialan vidilon inter viaj okuloj kaj la fotoj. La ilo estas el papero kaj tralasebla filmo, sed ne estas maŝino. Mirige, vi "sentas" la objekton 3-dimensie. Jen estas STEREOFOTO, kaj la maniero foti nomiĝas STEREOGRAFIO, uzante STEREOFOTILON.

Pri tiuj aferoj, s-ro Nanba klarigis, montrante diversajn stereofotojn, kun la speciala ilo. Ni aŭskultantoj povis ĝui ilin. En la prelego, li enkondukis specialan prefikson "STEREO-", sed krom tio, li uzis facilajn esperantajn vortojn.



stereofota vidilo

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

LETEROJ

el Varsovio, Pollando

6-a de novembro

Karegaj,

[...] Kun maltrankvilo kaj malĝojo mi legis viajn informojn pri Japanio, en kiu situacio daŭre malstabilas. Damaĝis ĝin ĉi jare kelkaj tertremoj, kies plej damaĝa marta tertremo kaj cunamo sekvinta ĝin daŭre sentiĝas certe en via ĉiutaga vivo. Mi scias, ke Japanio troviĝas en tre maltrankvila mondregiono se temas pri tertremoj, sed la nuna jaro ŝajnas al mi aparte malbona ĉi kuntekste.

Mi pensas, kiel fortaj devas esti vi japanoj, strebantaj plu vivi, ĝui laŭvicajn tagojn en tiom malfavoraj cirkonstancoj. Grandan admiron mi havas por via spirito, persisto kaj kuraĝo. Miaj pensoj estas ne sole kun vi persone (kvankam ĉiutage mi pensas pri vi), sed ankaŭ kun via tuta nacio. [...]

Gabriela Kosiarska

el Ŝanhajo, Ĉinio

10-a de novembro

[...] En Shanghai jam estas iomete da malvarmo kaj mi jam pliigis vestojn. Mi ankaŭ ne uzas hejtilon. Mi tralegis la gazeton per unu spiro kaj mi tre ŝatas la gazeton, precipe la BLANKA ROZO. Ĝi estas kortuŝa. Traleginte mi iom malĝoja por la sorto de la gefratoj. [...]

Ji Yingeng



BELETRO

Rakontas Paperlanterno

Komentario

*Pri la verkinto: Vasilij Eroŝenko (1890-1952) estas rusa poeto-fabelisto, kiu perdis vidpovon en infanaĝo. Li loĝis en Japanio de 1914 ĝis 1916, kaj de 1919 ĝis 1921. Dume li vojaĝis en Hindio, Ĉinio ktp. La finajn jarojn de la vivo li pasigis en la patrolando. Li multe verkis en Esperanto kaj en la japana. Multaj el liaj japanlingvaj verkoj estis esperantigitaj, kaj aperis en la serio kompilita de Mine Yositaka, kune kun liaj esperantaj originaloj.

*Pri tiu ĉi rakonto: La verko ĉi tie prezentita estis publikigita en 1916 en la japana, kaj ne estis esperantigita ĝis nia provo.

*Tradukado: La esperanta versio estas rezulto de la kooperativa traduko de Jokohama Salono (unu el la klasoj en Jokohama Esperanto-Rondo). La verko estis dividitaj en 6 partoj, kaj la 7 membroj tradukis poparte. Post reciproka kritikado, la verko estis denove kunmetita por havi koheran fluon.

Originalo de Vasilij Eroŝenko en la japana lingvo
Koopera traduko de Jokohama Salono
[respondeca tradukinto por parto estas montrita en krampoj]

[de ĉi tie, trad. de SIBAYAMA Noriko]

Ŝi lumigis min per sia amo, kaj skribis sur mia interna muro, "Mi amas nur vin." La amo fariĝis mia vivo, kaj pro la amo leviĝis bela lumo.

Multaj homoj ŝajne festis ion, kun belaj kostumoj, kun brilaj mienoj nedireblaj, ĉarme ridetante kvazaŭ *Ebisu*, Dio de Feliĉo, portante belan paperlanternon, jen sidante sur diversaj boatoj, jen dancante sur la bordo, jen tamburante, jen ludante ŝamisenon.

Mi tuj komprenis, ke ili festas mian naskiĝtagon, kaj mi des pli lume brilis ol antaŭe. Inter multaj lanternoj, mia lumo estis la plej bela kaj plej mistera.

Vidinte ĝin, ili ĝojis kun feliĉa mieno, jen rememorante amuzajn aferojn en la juneco nekonatajn de aliaj, jen parolante per ordinaraĵoj vortoj, kiuj kaŝis profundan signifon. Ĉu ekzistas io alia, kio ĝojigas iun, krom lumo de amo?

Ankaŭ ŝi, rigardante la lunon, kapjese murmuris sur malgranda boato, "Tiu ĉi lumo de la lanterno havas pli gravan signifon ol via lumo."

"En mallumo, kiu ajn lumo havas signifon." diris la luno, kaj kolere kaŝis sin en nebuleton.

"Ĉu veras, ke en mallumo, kiu ajn lumo havas signifon? Ĉarmaj ondetoj de maro ridis rigardante min kaj la lunon alterne. Ĉu tiuj flirtemaj ondoj vere komprenas, kio estas lumo?"

[de ĉi tie, trad. de KOYAMA Takesi]

Ŝi rakontis al mi, kvazaŭ ŝi rememorus ion.

"Nu, mi unuafoje renkontis lin en la Parko Ueno. Ŝajnis al mi, ke li vizitis tien por admiri sakurflorojn kun multaj alilandanoj, sed li klinis la kapon fermante la okulojn kaj ŝajne vidis nenion. Rigardante lian aspekton mi havis misteran senton. Kion li pripensas? Kial li estas tiel laca kvazaŭ li ne volus vidi belajn florojn? Ankaŭ mi forgesis la florojn kaj rigardadis nur lin. Kiam li pasis preter mi, mi intence diris al li.

--Hodiaŭ okazos io alia pli interesa ol sakurfloroj en la parko. Li tiam levis la kapon kaj turnis sin al mi kun nekomprenebla mieno."

Ŝi ne vidis la boaton ornamitan de belegaj floroj, nek aŭskultis gajajn muzikojn kaj forgesante ĉion alian ŝi rakontis al mi sian rememoron observante nur mian lumon.



"Iuvespere li venis al nia amuzejo kun alilandanoj. Li sidis malgaje kun la klinita kapo havante nenian intereson. S t r a n g u l o ! Rigardante lin mi kantis la plej bonan kanton. Li aŭskultis

mian kanton kaj lia vizaĝo hele ŝanĝiĝis iom post iom. Do mi komprenis ke li amas min."

[de ĉi tie, trad. de SIBAYAMA Zyun'iti]

Ŝi alparolis min tiel, eventuale por naski en mi ĵaluzon. Sed amo vera ne bonvenigas ĵaluzon.

"Plurajn fojojn li vizitis nian amuzejon. Mi plurajn fojojn ŝercis kun miaj gastoj, li aŭdante tion paliĝis, nur kun kapo klinita. Mi konscias, ke li amas min. Sed tamen... kial li neniam rigardis mian vizaĝon? Kial li neniam turnis siajn okulojn al mi? Se li rigardus min nur unu fojon, li komprenus ĉion ĉiom. Sed li estis ulo stranga... Kiel estus, se li ne estus ulo stranga? Tiaj uloj ja trovas sin multaj... Iun vesperon, kiam mi preterpasis lin, mi faligis violon(*) apud lin. Tute ne intence. Li afektis eĉ tion ne vidi. Mi ne intence faligis violon. Sed... iun vesperon lia amiko invitis min, 'Ĉu vi pasigos tempon amuze kun ni?', mi malakceptis tion respondante, 'Pardonon, mi estas okupita kun aliaj gastoj, kaj tial ne estos kun vi.' Verdire, neniu vokis min. Sed... kial li tute ne rimarkis la violon, kiun mi faligis?... Iun vesperon li alparolis sian amikon jene, 'Se mi ne havos aliajn fendaĵojn, mi reiros mian patrolandon post mallonga tempo.'

[de ĉi tie, trad. de Mizro Iwaya]

Kiam mi proksimiĝis al li, li diris, 'Eĉ se mi iros al mia hejmlando, la feliĉo restos ĉi tie.' Kaj li turnis sian rigardon al mi, sed evitis turni ĝin al miaj okuloj. Kial? ... Nun, li atendas mian respondon sur la boato. Jam mankas tempo... Nu, lanterno! Transsendu ĉiun fakton al li, mi petas."

Post tio, ŝi diris al la boatisto.

"S-ro boatisto, iru kaj preterpasu plej proksime de la boato kie sidas multe da alilandanoj. Mi volas transporti tiun lanternon al ĝi."

Kiam nia boato ĝuste pasis preter la celita boato kun multe da alilandanoj, ŝi pasigis min al samboata sidanto kun tremantaj manoj kaj diris,

"Transsendu ĝin al jena malĝoja sinjoro."

La pala sinjoro demandis ŝin, "Ĉu al mi?"

Ŝi respondis, "Jes, al vi."

"Sinjoro Paperlanterno, kion ŝi konfidis al vi? Kion vi transdonos al mi?"

Li demandis min, kaj do mi respondis.

"Mia lumo estas bruligita de ŝia amo. Mia lumo estas pli atentinda ol tiu de la luno. Ŝi amas nur min. Tion al vi transsendi ŝi petis min."

[de ĉi tie, trad. de AIDA Yayoi]

"Aha, mi komprenis. Nur luma aĵo kaj brilaĵo plaĉas al ŝi. Ŝi ne admiras la lunlumon malproksiman; ĝi ŝajnas al ŝi ne tiel signifoplena kiel la paperlanterno. Ŝi amas nur paperlanternon."

Liaj larmoj tuŝis mian lumon kaj preskaŭ estingis ĝin. Post ioma tempo mi denove eklumis kiel antaŭe. Ĉu la lumo de amo perdiĝus pro larmoj?

La boato kun eksterlandanoj refoje renkontis ŝian boaton kaj tiam unu el liaj amikoj ĵetis al ŝi la paperlanternon en la vizaĝon kaj kriis, "Vi estas senkompata virino".

"Ne tia virino estas vi, kara geĝŝo." diris la palvizaĝa sinjoro, "Mi dankas vin pro via

honesta respondo. Mi ne bezonas kompaton. Adiaŭ! Mi deziras al vi feliĉon."

Li ordonis proksimigi la boaton al la granda ŝipo ekveturonta al fora lando. Ŝi ploris kun la kapo klinita al la akvo. Kial ŝi ploris? Mi ne scias la kialon.

[de ĉi tie, trad. de NAKAGAŬA Teruo]

"Jam ĉio estas finita. Estas la fino de bela espero... Li ne volis ami min... mia violo ne povis ludi kiel violo. Do kial li montris palan vizaĝon, kiam mi interbabilis ŝercon kun aliaj gastoj? Kial li ŝanĝis sian mienon, kiam li aŭdis mian voĉon? Kial li devis peti al alia homo la respondon? Ĉu geĝŝo estas tia virino kun kiu oni ludas nur por ŝerco...?"

Ŝi diris tiel kaj ploris.

Denove vidante min kaj la lunon, ĉarma ondo de la maro diris kaj ridis. "Kiam estas malluma, kia ajn lumo estas dankinda."

Ŝi estis ploranta. Kial ŝi estis ploranta? Ĉu mi ne amis ŝin pli ol vivon? Nur ŝia amo estis mia lumo, ĉu ne? Ŝi estas mistera virino.

"Hoo, en la boato kiu atingis al tiu granda ŝipo, unu blindulo ŝajnis ensipiĝi, ĉu ne?"

Mia boatisto demandis al amiko en la boato preterpasinta unu la alian, kaj la amiko respondis.

"Eble li estas blindulo."

"Certe li estas blindulo."

Tiam ŝi subite levis sian kapon kaj demandis.

"Kie?"

"Tie."

Ŝi alte levis min kaj diris,

"Blindulo? Ĉu li estas blindulo?"

[la fino]

*Rimarko: "Violo" havas signifon, ke "vi aspiru al mi".

